
TERMINOTEKO

Informilo pri terminara laboro en Esperanto en kunlaboro kun

Perkomputora - Termino - Kolekto

(Pekoteko)

aperas laŭbezone; represo kaj diskonigo de la informoj estas dezirata

Redaktanto: Bernhard Pabst, Südweg 42, D-53773 Hennef, Germanujo

Cirkulero n-ro 10 (4a jaro, 2/1994) «94-12-01»

Estimata sinjorino, estimata sinjoro,
karaj geamikoj,

du eventoj elstaris en 1993 sur la kampo de Esperanta terminologio. Pozitive estis la apero de printita versio de Plena Pekoteko 1985-90 (PP). Negative la fakta dissolviĝo de Terminologia Esperanto-Centro de Universala Esperanto-Asocio (TEC). Pri ambaŭ temoj ni jam raportis en ckl. 8. Pliajn informojn vi trovos en la nuna numero.

Malgraŭ la fakta malapero de terminara Esperanto-organizo ni denove povas raporti pri multaj kurantaj terminaraj projektoj, alfabeto de Aŭstralazia ĝis Ŝaka terminaro. Jen ĝojiga fakto, kiu denove pravas, ke pli grave ol ĉiuj organizaj demandoj estas vekaj kaj stimuli la intereson por terminaraj demandoj ĉe niaj aktivuloj kaj peri inform-interŝanĝon. Jen kion alstrebas ankaŭ tiu ĉi numero de »Terminoteko«.

Tre ĝojiga estis la eĥo al niaj ckl. 7 kaj 8. Multaj interesatoj skribis, informis, kontribuis. Al ĉiuj ni plej kore dankas. Samtempe ni petas komprenemon, ke mi

ne ĉiam kaj precipe ne ĉiam tuj povas respondi per persona letero. Tio superirus niajn fortojn. Ni tamen certigas vin, ke ni ĉion atende legas kaj laŭeble pludonos al nia terminara rondo.

Sincere

pb

enhavo

Saluton	1
enhavo	1
pekoteka	1
TEC dissolviĝis	3
lingvo-observanta	4
terminikaj diskutoj:	4
novaj terminaroj	6
terminaraj projektoj	13
nijaj vortaristoj: Ebbe Vilborg ..	20
info-miks	21
korektoj / reagoj	23
respondilo / terminara skemo.....	24

1.1 pekoteka ...

La kolekton de Perkomputora Terminokolekto (PP) senkoste ricevis - kiel konate - i.a. ĉiuj membroj de la Aka-

demio de Esperanto kaj kelkaj terminaraj aktivuloj. Intertempe la unuaj reagoj alvenis ĉe la redaktoro de PP, Akademiano Rüdiger Eichholz. Li (parte) publikigis ilin en sia 44-paĝa «Cirkulero EP 93/6», „Dekunu Paroladetoj pri Pekoteko“, kiuj traktas diversajn aspektojn de Pekoteko, ekz.: „Koncepto, nocio, termino“, „la strukturo de Pekoteko“, „kiel trovi terminojn por ĉiutagaĵoj?“, „Pekoteko: ne nur terminaro, sed metodo“, k.m.a. La verketo, tre interesa por lingvaj aktivuloj, estas havebla de sinjoro Eichholz, Bailieboro, Ontario, Kanado KOL 1BO. Ni citas el paĝoj 35-36:

Akademiano Pettyn (redaktoro de la Esperantaj elsendoj de Pola Radio, Varsovio): «Gratulegon pro la mirinda trivoluma verkego! Morgaŭ mi tuj rakontos en 5-minuta programero pri ĝia apero kaj de lundo mi komencos en kelkaj programeroj prezenti ĝian enhavon.» (93-03-27)

«[Mi deziras] pli amplekse popularigi vian tre utilan laboron.» (93-03-30)

Pastro Bernhard Eichkorn, Villingen-Schwenningen Germanujo, i.a. kunordiganto de Plantvortaro kaj prilaboranto de aktualigita kristana terminaro: «monto da materialo utila por mi» «93-03-19»

Akademiano doktoro Minnaja, Padovo Italujo, kiu aktuale preparas vortaron Italian-Esperantan: «... Intertempe min atingis la grandioza trivoluma verko Pekoteko, pri kiu mi ege dankas. Kompreneble mi ne sukcesis ĝin trastudi, kvankam mi bone legis la principojn kiuj ĝin regas. Volonte laŭ mia kapablo mi povos kunlabori pri italaj terminoj...» (93-04-23)

Akademiano doktoro Broadribb (Bakers Hill, Aŭstralio, redaktoro de «Esperanto sub la Suda Kruco»): «Min atingis bon-

state la tri volumoj de Plena Pekoteko 85-90 antaŭ kelkaj tagoj, kaj mi nun zorge trastudis ilin kaj plenigis vian formular(i)on, kiun mi nun resendas. Farante tion mi konstatis ke la Pekoteko estas eble la plej grava entrepreno ĝis nun farita en Esperanto. Mi varme gratulas vin pro la ĝisnuna rezulto kaj povas nur miregi ke vi povis/povas dediĉi tiom da tempo kaj laboro al ĝi. Mi pretas aktive kunlabori pri la projekto. ... Mi bedaŭras ne esti povinta partopreni vian projekton jam antaŭ longe ...» (93-04-12)

Sinjoro Doug Portmann, Naperville, Usono, i.a. aŭtoro de Biblioteka Terminaro kaj de la Kemia kaj Scienca-Teknika Vortaro: «... mi certas, ke ĝi estas granda kontribuo al la esp-a terminologio.» (93-06-20)

Wera Blanke, Germanujo, eksa TEC-vidulino: «... impona verkego!» (93-04-16). Tamen ĝi rifuzas okupiĝi pri la lingvaj demandoj de Pekoteko kaj plenigi la respondilon, ĉar ŝi «ne opinias tre utila aranĝi voĉdonadon inter hazarde elektita personaro kiu reprezentas nek fakularon nek „esperantistaron“.»

Simile reagis sinjoro Jan Werner, i.a. aŭtoro de «Terminologia Kurso» kaj «Matematika Vortaro» el Brno, Ĉeĥujo, kaj same aktivulo de la iama TEC: «... mi konfesas, ke mi ne okupiĝos pri la kompilaĵo, ĉar ĝi ne meritas investon de mia ne tro vasta libera tempo. Tiu ĉi starpunkto reflektas nesufiĉan kvaliton de la ampleksa verko. Koncize:

1. PEKOTEKO estas sistemo, kiu konscie ne atingas komune akcepteblan solvon de terminaroj, ĝi toleras individuajn elekton el pluraj proponoj. 2. ... (93-04-07)» [!!]

Male d-ro Bodo Schneider, Hamburgo Germanujo, juĝas en Esperanto aktuell

1994/6, p. 8-9: «Do, la PeKoTeKo povas esti vere demokrata terminaro, se nur la uzantoj uzas siajn rajtojn, en tiu verko kontribui al la diskuto pri lingvaj demandoj» kaj resumas, ke li taksas Pekotekon «tre valora por la evoluo de Esperanto, kaj mi esperas, ke la gravuloj de la movado ankaŭ ekkonas tion».

Do, ĉiuj kiuj ne timas «individuan elekton el pluraj proponoj» kaj ŝatas kontribui al la evoluo de Esperanto per demokrata maniero estas kore invitataj eklabori sur terminara kampo. Publika respondo de sinjoro Eichholz al sinjoro Werner cetere troviĝas en la menciita cirkulero EP 93/6 p. 32 ss.

Volonte ni aŭdos vian opinion pri Pekoteko, ĉu laŭdan, ĉu kritikan.

1.2 Pekoteko por Mekintoŝ-komputoroj

D-ro Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill, WA 6562, Aŭstralio, sukcesis aŭtomate konverti Pekoteko-dosierojn el la formato de WordPerfect por IBM-kongruaj komputoroj al Word 5 por Mekintoŝ-komputoroj. Tiel grava ĝisnuna bariero inter la du plej disvastigitaj mikrokomputoraj sistemoj forfalis kaj mondovasta kunlaboro inter Esperantistoj-terminaristoj pli faciligis. Ni kore gratulas al d-ro Broadribb pro tiu sukceso kaj dankas al li pro lia preteco „ponti“ inter la komputoraj sistemoj. Do, Mekintoŝ-uloj turnu vin al Aŭstralio kaj ekagu!

1.3 TEC dissolviĝis

Post iom pli ol 2 jaroj aperis TEC-bulteno n-ro 9 datita «majo 1993» kaj

redaktita de sinjorino Wera Blanke. Ĝi kronikas la aktivecojn de la TEC-konferenco 1991 dum la UK en Bergeno tra tiu de 1992 dum la Viena UK ĝis la «aventura transporto de la zagreba AT-komputilo tra Hungario al Ĉeĥoslovakio», nome al Kladno ĉe Prago. Ŝpardevoj de UEA, kiu financis TEC kaj ties Zagreban oficejon (laste en 1993 per «ne pli ol 7000.- NLG»), kaj fine la Serba-Kroata milito devigis fermon de la buroo malgraŭ la penoj de la sekretariino Ankica Jagnjic. Sinjorino Blanke «post 10 jaroj da ŝtrecaj klopodoj» (inter la fruaj kontribuoj komparu ekz. AEST 1984, p. 99-105) rezignis pri plua laboro «pro personaj kaŭzoj». Juĝi pri idearo kaj rezultoj de TEC en rilato al ties kostoj iam devos historiistoj. Ni memorigas nur, ke oni ja sukcesis starigi kontaktojn al internaciaj ne-Esperantaj terminologiaj fakorganizaĵoj (ĉu ili ankoraŭ ekzistas, ni bedaŭrinde ne scias), sed eĉ ne unu terminaron laŭ la propra principaro aperigis.

Tiu terminologia materialo, kiun oni povis savi el Zagrebo, iris al «TEC-CS» gvidita (kaj gvidata ??) de sinjoro Jan Pospíčil. Malgraŭ la sama nomo tio ankaŭ ideo signifis fundamentan ŝanĝon. Celo de sinjoro Pospíčil en somero 1992 i.a. estis «pruv[i] ke TEC ja kapablas produkti terminarojn». Rezulto estas listo de disponeblaj terminaroj en TEC-bulteno n. 9, p. 7 kun interesaj informoj i.a. pri terminaroj pedagogia, ekologia k.a. De post la komuna Ĉeka kaj Germana kongreso dum pentekosto 1993 en Karlovy Vary (Karlsbado), dum kiu ni interŝanĝis ideojn kun sinjoro Prospíčil, ni tamen bedaŭrinde nenion plu aŭdis de TEC-CS. Sur p. 8 de la citita bulteno sinjoro Prospíčil en majo 1993 skribas, ke «[s]e ne venos helpo nun ..., la TEC-oficejo post du monatoj ne ekzistos, ĉar ni devus la ĉambron mallui.» Ni sincere esperas, ke li

=====
sukcesis venki la obstaklojn. Ĉiujn informojn pri la plua evoluo bv. komuniki al ni. La adreso de inĝ. Jan Pospíčil je 93-05 estis: Petro_radská 3112, CZ-272 04 Kladno, Ĉeĥujo. Pri TEC-UEA skribu al D-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-21031 Hamburg, Germanujo.

1.4 lingvo-observanta ...

Nia revueto origine estis cirkulero por aktivaj „lingvo-observantoj“, t.e. lingvo-konsciaj Esperantistoj, kiuj „observas“ la aktualan lingvo-uzon en Esperantaj publikigaĵoj kaj notas „vortojn de la nuntempo“, ne jam troveblajn en Plena Ilustrita Vortaro (PIV) aŭ en gvidaj etnaj Esperanto-vortaroj, laŭ la skemo de Pekoteko (detalojn vd. en nia ckl. 1 de decembro 1991, kiu estas daŭre havebla). Ni tial ĝojas, ke ni tiu-numere povas reveni al niaj komencoj kaj raporteti pri novaj aktivuloj sur nia kerna tereno.

Malagasa ...

Multajn terminojn Francajn diligente sciigis al ni sinjoro Albert CNUUDE (nom-mallongigo ca), Route du Périmètre, 95, F-74000 Annecy, Francujo. Sinjoro Cnudde antaŭe vivis sur la tropika insulo Reunio en la Hinda Oceano, kiu estas Franca transmara departemento oriente de Madagaskaro. Eble pro tio li dankinde sendis al ni ne nur Francajn, sed ankaŭ tradukojn Malagasajn (jen la PIV-a termino), resp. Malgaŝajn (jen la termino preferata de ca). Tiel nia komuna termino-kolekto nun enhavas eĉ vortojn en tiu (geografie) Afrika lingvo, ĝis nun tre malofta en Esperantujo. La libro-katalogo de UEA registras nur tri verk(et)ojn, inter ili la «Vortareto Esperanto-malagasa, Rako-

tondravao, Roterdamo: UEA, 1982, 39p.» Krome ekzistas la «Vortareto multlingva» en «La Jaro», praktika poŝkalendario de Monato, 1990 I p. 64-77 kun parto Malagasa. Do nova „preskaŭa“ unikaĵo de Pekoteko. Jen pro spaco-manko nur unu el la de ca kompletigitaj nocio-kompleksoj. La lingvo-siglo {mg} indikas la Malagasan:

```
{eo1} bicikl/o *a*d
{eo2} bicikled**/o *b ARĤ *c
{de1} Fahrrad n *c
{en1} bicycle *c
{en2} bike colloq *c
{fr1} bicyclette f *c
{mg1} bisikileta *e
```

Velocipedo kun du egalaj radoj: ÷isto^Z.
*a

Fon: *a PIV; *b Coppet, Frazaro, p15; *c pb; *d 1aOA; *e ca[pb];

9 1 / p b - 0 9 8

Rim: pb: {eo2} uzata en la Frazaro de Coppet de 1908 estas interesa ARĤ baziĝanta sur la Franca, kaj Itala formoj kun la Eo-tipa ŝanĝo de radikfina -et(t) al -ed. Jam unu jaro poste tamen la hodiaŭa formo, baziĝanta sur la pli mallonga Angla fariĝis oficiala per la 1aOA de 1909. «93-08-20»

Ni ĝojus, se la ekzemplo de sinjoro Cnudde instigus aliajn „lingvo-observantojn“ (re-)aktiviĝi.

2 terminikaj diskutoj

La sekvanta artikolo baziĝas sur kontribuo de Akademiano Eichholz, kiun pb mallongigis kaj adaptis por la legantoj de Terminoteko.

Kiel trovi trafajn terminojn por ĉiutagaj nocioj?

Al Esperantistoj ofte mankas terminoj por modernaj nocioj, kiuj ankoraŭ ne estas registritaj en etnolingvaj-Esper-

antaj vortaroj. Kion ni povus fari por helpi nin?

1. La plej rekomendinda metodo estas krei novan terminon el jam ekzistantaj elementoj de nia lingvo. Ekzemple por la Germana *Strumpfhose* aŭ la Angla *pantie-hose* ni povus krei la terminojn „pantalon-ŝtrumpoj“, „ŝtrumpo-pantalo“, „ĝistalia ŝtrumpo-paro“. PIV nomas tiun nocion „ĝistaliaj ŝtrumpoj“. Sed kiu termino estas preferinda? Dezirinde estas, kompreneble, ke nur unu termino ekzistu. Kutime oni selektu tiun terminon, kiu estas registrita jam en PIV. Sed en tiu verko bezonata termino estas kelkfoje nur malfacile trovebla („ĝistaliaj ŝtrumpoj“ estas registrita kiel lasta ekzemplo por „ŝtrumpo“). En la Esperanta Bildvortaro la nocio ankoraŭ ne estas bildigita.
2. Danĝere estas solvi la problemon per la dua vojo, kiel montras la artikoleto «kolantoj, kolgotoj», en „esperanto“ (aprilo 1993, p.72). Jen citaĵo:
«Tute alia situacio kreiĝis kiam mi eklaboris en nia „Esperanto“ Komercagado (EKA). Fakte ekzistas en la mondo miloj kaj miloj da komercaj artikoloj, kiuj ne havas Esperantan nomon. Sekve ni devis inventi ilin! Temas pri serioza problemo, ĉar kio okazus se diĉe en la mondo oni uzus malsaman nomon por la sama varo? Jen klariga ekzemplo: Parolante pri virinaj kalson-ŝtrumpoj okcidente nomataj „collants“ mi uzis la vorton kolantoj, sed miaj rusaj kunparolantoj absolute ne komprenis pri kia varo mi parolas. Poste ili demandis min pri kolgotoj, vorto tute ne konata al mi. Nur post longa baraktado mi fine komprenis, ke ni parolas pri la sama aĵo. Ĉiutage aperas pluaj tiaj problemoj: „ĉemizo“ havas ekzemple tro limigitan signifon por dekoj da

tute malsamaj brustovestoj. Aŭ: ekzistas du apartaj tipoj de porvirinaj kalsonetoj (ne kalsonoj!), kiujn komerce oni nomas *slip* kaj *boxer*. Esperante do, ĉu „slipo“ aŭ „slipeo“, „bokso“ aŭ „boksero“?

La Akademio verdiktas pri la oficialeco de nova termino nur kiam longa, sistema uzado sankciis ĝin. Sed dume ĥaose enkondukiĝas malkongruaj formoj. Ĉu oni povus starigi malgrandan komisionon de du aŭ tri kompetentuloj, kiuj povus doni sian rapidan juĝon rilate al enkonduko de nova radikoj, difinanta objekton pri kiu ankoraŭ ne ekzistas ĝenerale uzata Esperanta termino? Liston de novelektitaj vortoj oni povus aperigi en la ĉefaj E-gazetoj, kiuj sendube ne rifuzus doni al sia legantaro tiun ĉi servon.

Ni kreis nian EKA por disvastigi la internacian lingvon kaj doni eblon al esperantistoj gajni monon per ĝi. Ĉu por daŭrigi nian agadon, pro manko de taŭga vortprovizo, ni devos ekuzi la anglan? „Siriusano“ (laŭ „La eta gazeto“ revuo de Triesta E-Asocio, Italio)»

Tiu pragmata artikolo tre bone montras la problemojn, kiuj alfrontas nin. Feliĉe ne plu necesas krei tiun komisionon, ĉar tiun taskon pli efike povas plenumi la Pekoteko-metodo, pri kiu Akademiano Eichholz jam ofte atentigis Esperantistojn (ankaŭ en la Esperanta Bildvortaro). Tamen evidente ne sufiĉe ofte, ĉar tiu artikoleto malkaŝas, ke eĉ lingvaj aktivuloj ne estis informitaj pri ĝi. Se Siriusano estus skribinta al la Akademio, Sekcio Fakaj Vortaroj, sinjoro Eichholz estus rekomendinta al li la terminon „ĝistalia ŝtrumpo-paro“. Krome, por averti aliajn Esperantistojn, li leginte tiun artikoleon, tuj registris Pekoteko-komplekson 93/135 pri tiu ĉi nocio:

{U1} 646
 {T1} TNI
 {eo1} ĝis'tali/a ŝtrump/o-par/o *a
 {eo2} ĝis'tali/aj ŝtrump/oj *b
 {eo3} pantalon-ŝtrump/oj *c
 {eo4} ŝtrump/o-pantalon/o *a
 {eo5} kolant**/oj *f EVIT *a
 {eo6} kolgot**/oj *f EVIT *a
 {de1} Strumpfhose *f* *ĉ
 {en1} pantie-hose *ĉ
 {es1} leotardos _ los *d
 {fr1} collant *m* *d
 {nl1} panty *e

Longa pantalono kun ŝtrumpoj
 el ŝtrump-materialo. → EB3/32=12 *a

Fon: *a ei; *b PIV; *c ei: mi ie renkontis tiun terminon, sed ne memoras la fonton; *ĉ DB3-DeEn; *d DB3-EsFr; *e DB3-DeNI; *f Esp93/p72;

9 3 / 1 3 5

Rim: ei (93-05-05): {eo1} ŝajnas al mi la plej trafa termino, ĉar ĝi evitas la misgvidan Anglisman pluralan finaĵon, temas pri nur unu pantalono, al kiu estas fiksitaĵ du ŝtrumpoj. La evitindecon de {eo5} aŭ {eo6} montras la artikolo *f. «93-05-05»

Lingvaj aktivuloj, kiuj sentas la mankon por terminoj, tial povas Pekotekante ricevi pli rapidan respondon al iliaj problemoj, ol se ili estus devigitaj atendi publikigon de respondoj en iu revuo. Pekoteko-registraĵoj estas rapide trovblaj pere de UDoKo kaj pere de multlingvaj indeksoj.

Por ke ni disponu pri la dezirataj modernaj terminoj, ĉiuj pri la lingvo-evoluigo interesitaj Esperantistoj eklaboru laŭ la sama skemo: Se iu konstatas mankon de termino, tiu difinu ĝin kaj atribuu al ĝi tiujn etnolingvaj terminojn, pri kiuj la difinanto certas, kaj aldonu, se necese, desegnon. Sendante ĝin al la Pekoteko-redakcio li rapide ricevas respondon al sia problemoj kaj ĉiuj interesatoj povas estonte profiti de la pripensoj.

3 novaj terminaroj

3.1 Ĝeneralaj vortaroj

Angla...

Wells, J(ohn) C(hristoper), Concise Esperanto and English Dictionary, Sevenoaks [GB]: Hodder & Stoughton, 419 p.

La unua eldono de 1969 reaperis en 1992 en la 13a (!) neŝanĝita eldono. Jen certe unu el la vortaraj klasikaĵoj en Esperantujo havinda por ĉiu Esperantisto kun ioma kono de la Angla.

Germana I...

Krause, Erich-Dieter. Wörterbuch Deutsch-Esperanto. Leipzig, Berlin, München [D]: Langenscheidt Verlag Enzyklopädie, 2. durchgesehene Aufl. 1993, 592 p.

La «Krause» nun reaperis en dua iom ŝanĝita eldono. Tio certe estas sukceso por Esperanto, ĉar eldonas ĝin post la aliĝo de GDR al okcidenta Germanujo nun la plej grava Germana eldonejo por lingvo-libroj, nome «Langenscheidt», tiel ke la vortaro estas facile akirebla per ĉiu librovendejo. La ŝanĝoj estis precipe forstrekoj de „socialisma“ terminaro ligita al la GDR-a sistemo. Mankas nun ekz. enskriboj kiel «sozialistische Gesellschaft», «←es Lager» kaj «Große Sozialistische Oktoberrevolution», k.a. tiel ke la dua eldono havas tri paĝojn malpli ol la unua. Malmultajn novajn enskribo-titolojn oni aldonis, ekz. «Soufflé n Kochk sufleo». Bedaŭrinde oni do precipe forstrekis, sed apenaŭ ŝtopis kelkajn truojn, ekz. pri kristana terminaro: Tiel ekz. «exkommunizieren» oni en la dua eldono same vane serĉos kiel en la unua.

Germana II...

Okelmann, Franz. Wörterbuch Esperanto-Deutsch, Bayreuth 3a eld. 1993, ISBN 3-9802771-2-7.

Okelmann, Franz. Wörterbuch Deutsch-Esperanto, 2a eld. 1992, 474 p. A5, Bayreuth [D]: La aŭtoro.

Post 1987 (1a eldono, jaro ne indikita) kaj 1989 (2a; vd. la recenzon en Esperanto aktuell de sept. 1989) en decembro 1993 aperis jam la 3a eldono de la konata vortaro Esperanto-Germana de Okelmann. Ĝi nun havas - tre salutinde - fortan kovrilon kaj pro la ISBN-numero estas pli facile akirebla tra la kutimaj libromerkataj kanaloj. Jen do du paŝoj al plia profesieco. Enhave la baza principo restis neŝanĝita, tamen multaj eraroj estas korektitaj kaj kelkaj vortoj aldonitaj. Ne jam tute kontentigaj estas multaj pezaj kunmetaĵoj de registritaj tradukoj en ofte maleleganta Germana. Bedaŭrinde ankaŭ plejparte mankas frazeologio. Tamen entute, kiel skribis Ulrich Matthias en sia recenzo en Esperanto Aktuell 1994/1, p. 10 «[n]leprofesia sed utila».

Samspeca estas ankaŭ la nova eldono de vortaro Germana-Esperanto. Unike estas, ke la sama aŭtoro, preskaŭ tute sole, verkis dulingvan vortaron por ambaŭ direktoj, de Esperanto al la Germana kaj reciproke. La lasta granda „dukapa“ Esperanto-vortaro Germana estis la duopo de Bennemann el la dudekaj jaroj.

Ambaŭ estas mendeblaj ĉe la aŭtoro Franz Okelmann, Jägerstr. 10, D-95444 Bayreuth, Germanujo.

Franca ...

Le Puil, Jacques. Danvy, Jean-Pierre. Grand Dictionnaire Français-Espéranto. Paris [F]: France-Espéranto, 1992, 939 p.

Jen moderna vortaro Franca-Esperanta en formato kaj amplekso nur malpli granda ol PIV kun laŭ la enkonduko 32.000 titolo-enskriboj. Post la ĝis nun gvida vortaro de Léger kaj Albaut de 1961 ĝi prezentas la unuan seriozan provon al „granda“ vortaro, ĉar dum tiuj lastaj tridek jaroj aperis nur „praktikaj“ aŭ „poŝaj“ vortaroj Francaj (ekz. la «Dictionnaire de poche» de SAT-Amikaro en 1980 kun nur 56 paĝoj Franca-Esperanto en formato 14,5 x 10,5 aŭ la 2a neŝanĝita eldono de SAT de la «Dictionnaire Pratique» de 1974, kies 1an eldonon oni komencis jam en 1953 kaj aperigis en 1959). Komparante kun aliaj „grandaj“ lingvoj kaj pensante pri la fakta graveco de la Franca en la mondo do bedaŭrinde magra bildo. Des pli konvena estas la apero de la „Grand“.

Ĝian enhavan taŭgecon prijuĝi profunde nur povas Franclingvano, kiu utiligas ĝin ĉiutage. Emile van Damme klopodis tion (ne tre konvinke) en Monato 1993. Tamen ankaŭ fremdlingvulo kun baza kono de la Franca povas konstati ĉiajn detal-riĉon kaj modernecon.

La multaj subenskriboj eble estas la plej frapa eco de la vortaro. Mirigite oni legas artikolojn kiel «haut alta» aŭ «droit» (vd. mem!). Parolturnoj kaj frazeologio estas aldonitaj al jam multaj registritaj nuancoj de unuopa Franca vorto. Jen kiel oni deziras Esperanto-vortaron.

Pri la moderneco komparu nur enskriboj kiel «free-jazz improvizaĵo», «free-lance sendependa profesiulo», «freezer glacifako» aŭ «bombe A», «propulser», «missile» (la lasta bedaŭrinde kiel en PIV malbone kaj surface Esperantigita per «misilo»). Por

«ordinateur» (komputoro) oni donas nur «komputilon», kvankam same estas registrita «gejgera komputilo» kaj «gas-komputilo». La vortaro do sekvas la misan tradicion de la Budapeŝta skolo anstataŭ la tiukaze klaran distingon de PIV, respektive de ties Suplemento, tiel forigante la bazajn diferencojn inter tiuj du nocioj.

Kiel bedaurinde kutime en modernaj vortaroj kaj male al vortaroj el la dudekaj jaroj, oni ne atentigas pri aŭ eĉ glosas „neologismojn“, do hodiaŭ fakte ne-PIV-ajn vortojn. Ilin mi nur jen kaj jen trovis (ekz. «hapakso»), sen ke tio iel ŝokus. La manko de tia listo malhelpas al vortaristoj de aliaj lingvoj paŝi en la sama direkto kaj tiel malfaciligas unuecan lingvo-evoluon.

Sed jen, gravas ke Esperanto rehas modernan kaj detalan vortaron de la Franca. Bonvenon inter la ofte konsultitaj „gvidaj“ vortaroj.

Multlingva ...

Microlytics, Inc. UFO Systems, Inc., Xerox Corp. [produktinto]. Selectronics, Inc., Pittsford, NY 14534, USA [ĝenerala disvendanto]: Elektronika vortaro por 26 lingvoj kun po 1000 vortoj.

La lingvoj estas Angla, Germana, Franca, Itala, Hispana, Portugala, Nov-Greka, Nederlanda, Sveda, Norvega, Dana, Finna, Pola, Hungara, Ĉeĥa, Rumana, Rusa, Serbokroata, Turka, Araba, Japana, Hebrea, Svahila, Indoneza, Jida kaj Esperanto. La komputoreto estas 8,5 x 5,4 x 0,4 cm granda kaj ankaŭ uzebla kiel kalkulilo. En Germanujo ĝi kostas ĉ. 125 DM. [Laŭ informo de Frank Stocker en Esperanto Aktuell 8/93, p. 13]

Pola ...

Tadeusz J. Michalski, Esperanto-pola vortaro, Varsovio 1991, 542 p. ISBN 83-214-0688-2

Nova prilaboro de la vortaro de 1959 (ne indikita) kun ĉ. 15.000 radikoj kaj ĉ. 30.000 derivaĵoj kaj frazeologiaĵoj kun detalaj listoj de ĝeneralaj kaj sciencaj afiksoj, komunuzaj sigloj kaj «sigloj de Esperantistaj organizacioj» (!? tiel!), gramatiketo por Poloj kaj bibliografio.

La vortaro relative fidele sekvas la enskribo-titolojn de PIV, povas do esti rigardata traduko de tiu verko al la Pola. Jen kaj jen mankas „ekzota“ PIV-a kapvorto (ekz. «hakamo», Japana vestaĵo), jen kaj jen malnovaj neologismoj estas enŝovitaj (ekz. «abajuro», t.e. lamposirmilo, spurebla ĝis la Vortaro de Boirac de 1909, vd. detale PP#90/ac-0006). Ŝajne oni apenaŭ forstrekis, ĉar enestas tuta listo de ne-PIV-aj vortoj, kiujn malkovris André Cherpillod, kaj kiuj nun komentite troviĝas en Plena Pekoteko <PP>. Jen kelkaj ekzemploj, kiujn mi trovis perkomputore serĉante tra PP je litero „B“: bandio, banduro, baricentro, barkaso, biofiziko, ktp. Ĉiuj estas ne-PIV-aj kaj ĉiuj jam troviĝas en la eldono de 1959 kaj retroviĝas nun en tiu de 1991. Tio tamen neniel estu kritiko, kontraŭe. Aliflanke mankas kelkaj „modernaj“ vortoj (telefakso, mikroondo, video, ktp.). Entute do relative detala kaj „konservativa“ vortaro. Por la plej lastaj evoluoj de nia lingvo Poloj do ankaŭ estonte devos konsulti aktualajn kolektojn kiel Pekoteko.

Sveda ...

Sinjoro Karl-Gustaf Gustafsson, Aspvägen 1A, S-54141 Skövde, Svedujo, sendis al ni jenan informon pri la

=====
nova vortaro Sveda-Esperanta de Ebbe Vilborg. Ni tre dankas al sinjoro Gustafsson. Kiu pretas simile recenzi novajn vortarojn?

„Dum la kongreso de Sveda Esperanto-Federacio en Oskarsham, Svedio, en 1992 estis prezentita nova sveda-Esperanta vortaro de Ebbe Vilborg. Ĝi ampleksas preskaŭ 50000 vortojn. La prestipoj kaj la aranĝo de la vortoj donas allogan impreson al ĝiaj 478 paĝoj.

Ebbe Vilborg estas sperta leksikografo, kiu publikigis plurajn vortarojn. Jam 1957 li prezentis dudirektan vortaron, kiu enhavis proksimume 7700 vortoj en la sveda-Esperanta parto kaj 3900 vortoj en la Esperanto-sveda parto. En 1975 li publikigis «Supplement till Svensk-Esperantisk ordbok de Jansson-Linén-Gerdman»-n eldonita en 1934. Tiu sveda-Esperanta vortaro estis reverkita kaj kompletigita per pli modernaj serĉ-vortoj el la suplemento.

La nuna nova Sveda-Esperanto vortaro ne abundas je fakaj aŭ teknikaj terminoj. Tiun fakton la aŭtoro substrekas jam en la antaŭparolo. Komparinte la tradukproponojn Esperantajn por kelkaj fakaj kaj teknikaj terminoj kun iliaj difinoj en PIV mi plej ofte samopinias pri la proponita vorto aŭ esprimo.

Entute mi estas sufiĉe kontenta pri la nova vortaro atendata jam multajn jarojn (la unua manuskripto estis preta jam komence de la okdekaj jaroj). Ĝi sendube faciligos la traduklaboron por seriozaj Esperantistoj svedaj.“

3.2 terminaroj kaj specialaj vortaroj

Baka ...

Diestel, Wolfram (red.). Alfabeto Vortaro de nocioj pri bakado. s.l.

[Markkleeberg, D]: s.ind. [Esperanto-Junularo de Lepsiko] 1993, 13 p.

Ĉarman terminareton pri «Kukobakado» sendis sinjoro Diestel. Frukto de junulara renkontiĝo ĝi celas praktikan uzon, ne pluevoluon de la kuira terminaro. Tamen ĝi povas esti helpa ekz. por ekzercoj en kursoj. Krom kopiite ĝi ankaŭ estas havebla surdiskede, ĉu en la Vindoza originalo, ĉu en Pekoteko. Mendu la frandaĵon por 7,- DM (inkl. sendkostoj) de Wolfram Diestel, Bauvereinstr. 3, D-04416 Markkleeberg, Germanujo.

Dentika ...

Pavlík, Marián. Dentistry, Stomatologio. Kladno [CZ]: Terminologia Esperanto-Centro, fondacio Panglottia, 1992, 53 p. ISBN 80-901331-1-8.

Jen unu el la terminaraj rezultoj de TEC-CS, pri kiuj ni jam parolis en nia enkonduka artikolo en tiu ĉi numero. Stomatologio laŭ PIV estas «parto de la medicino, pri la buŝo k dentoj». Ni disponas pri trilingva printaĵo Esperanto, Angla Franca kun nocio-kompleksoj de la tipo

4.143

(eo) **cirklosegilo**

Tranĉinstrumento konsistanta el cirkla metallado, kiu portas dentojn sur sia periferia eĝo. Ĝiaj dimensioj kaj rigideco dependas de ĝia intencita uzado. [ISO-3.111]

(en) circular saw

(fr) disque-scie circulaire

La strukturo do estas tre simila al tiu de Pekoteko kun sistema ordigo, al kiu servas la ordonnumero «4.143», Esperanta termino, difino kun referenco al ISO-normo kaj Angla(j) kaj Franca(j) terminoj. La terminaro ekzistas en la

data-baza sistemo «Paradox 3.5 Runtime». Laŭ la enkonduko oni povas peti la deziratan duopon aŭ triopon de lingvoj (ŝajne inkluzive de la Ĉeĥa), kiu estos printita laŭ mendo. Interesatoj skribu al Jan Pospíšil, Petrohradská 3112, CZ-272 04 Kladno, Ĉeĥujo.

Etimologia ...

Ebbe Vilborg. Etimologia Vortaro de Esperanto. Volumo 3: K-M. Eldona Societo Esperanto. Malmö 1993, 128 p. ISBN 91-85288-21-7

Jen la tria volumo de tiu elstara kaj modela vortaro, aperinta en regula ritmo de du jaroj post la unua volumo 1989 (A-D) kaj la dua 1991 (E-Ĵ). Enhavo kaj formo estas la samaj kiel ĉe la unuaj du volumoj. Ĝi estas interesege por ĉiu, kiu volas profundigi en la historio de nia lingvo kaj malhavebla pro vortaristoj kaj terminaristoj, ĉar ĝi donas multajn ekzemplojn pri tio, kiel Zamenhof modele trovis harmonian ekvilibron inter kontraŭaj vortaraj principoj.

En tia multinforma libro mi nur malmultegajn eraretojn trovis. Ekzemple ĉe «koncepto» mankas la Germana formo «Konzept», manko iom malfacile komprenebla, ĉar ja temas pri tute neeksterordinara komuna vorto en tiu lingvo. Ĉu ne ekzistas German-lingva kontrolisto? Forme mi preferus daŭrigon de la paĝnombroj en la precipa parto de la verko trans la volumoj (krom la en la diversaj liveraĵoj ripetitaj listoj de mallongigoj kaj fontoj), tiel ke oni post espereble baldaŭa apero de la lasta kajero ekhavis unuecan vortaron, kiun oni povus kunbind(ig)i. Jen malgravaĵoj nur, kiuj neniel ŝanĝas la bazan impreson de unu el la plej interesaj vortaroj de nia lingvo.

Fervoja ...

Fervoja Terminaro Esperanto-Germana, Suplemento al Lexique Général des Termes Ferroviaires (UIC), s.l. [Bremen, D]: Terminara Komisiono de IFEF, Fervojistaj Sekcio de GEFA, 1993, 183 + 186 p.

La terminara laboro de la fervojistoj plursence estas modela. Jam en nia ckl. 8, p. 9 ni raportetis pri ĝi. Ĉiam denove aktivigita kaj instigita de la «Terminara Kuriero» (TeKu), eldonita de 1976 de sinjoro Heinz Dieter Hartig el Bremeno, Germanujo, kies 94a (!) numero aperis en aŭgusto 1994, la Germana sekcio nun sukcesis aperigi tiun Germanan-Esperantan-Germanan Fervojan Terminaron. Ĝi enhavas ĉiujn kapvortojn de la 4a eldono de la seslingva terminaro de Internacia Fervoj-Unio (UIC) kun Esperanta traduko laŭ la modelo

impulso 4556/01 Impuls

impulso alttensia (trakcirkvito)

4558/42 Hochspannungsimpuls
(Gleisstromkreis)

impulso ekscita 4557/01 Erregerimpuls

en la parto Esperanto-Germana aŭ

Hindernis auf dem Gleis 5891/23

surtraka obstaklo

Hindernismeldegerät 2648/41

obstaklo- detektilo

Hinfahrt 261/23 tienvojaĝo

en la parto Germana-Esperanto. La ciferoj referencas al la UIC-terminaro, tiel ke la Esperanta parto ankaŭ estas helpa por ne-Germanlingvanoj.

Bone printita kun multaj terminoj interesaj ankaŭ al najbaraj fakoj ĝi estas havinda ne nur por fervojistoj. La aktivecoj de la «terminara komisiono» tamen post la apero de la Fervoja Terminaro ne finis, tiel ke ni certe ankoraŭ povos raportoj pri ĝi.

=====
Kiu tiom longe ne volas atendi povas skribi al la sekretario por terminaraj aferoj, doktoro Heinz Hoffmann, Ledeweg 43, D-01445 Radebeul, Germanujo.

Matematika ...

Werner, Jan. Matematika vortaro Esperanta-Ĉeĥa-Germana. Brno [CS]: La aŭtoro, 1990, 184 p.

La terminaro enhavas 3722 terminojn laŭ la modelo

1923 kvartiko - kvartika f - Quartik f
1924 kvarternio - kvarternion m - Quarternion m

kun indeksoj Ĉeĥa kaj Germana kaj listo de naŭ fontoverkoj, precipe pli fruaj matematikaj terminaroj kaj fakaj tekstoj. Ĝi celas al «stabiligo de matematika terminaro en Esperanto». La fakan kvaliton ni neniel povas prijuĝi, ĉar niaj scioj pri matematiko estas nur lerneĵ-nivelaj. Malgraŭ ĝia malbona teknika kvalito (skribita per tajpilo, Germana «ß» transskribita per «ss») la verko tamen ŝajnas al ni jam pro la amaso de la facile konsulteblaj terminoj helpa kaj salutinda. Ni ĝojas, ke sinjoro Werner lezis siajn proprajn postulojn al scienca terminara laboro, kiujn li ofte prezentis, i.a. kiel konata aktivulo de la iama TEC aŭ en sia «Terminologia Kurso», inter ili la postuloj je nepreco de difinoj, sistema ordigo kaj internacia kunlaboro (nur pri la Germanaj terminoj helpis alilingvano, nome doktoro Martin Schüler). Ni ĝojas pri tio, ĉar alie ni eble nun ne (jam) disponus pri tiu terminaro.

Volonte ni publikigos fakan recenzon de matematikisto-Esperantisto. Anticipan dankon pro viaj kontribuoj.

Medicina ...

Schicke, Harald. La korpo de la homo. Enkonduko al konstruo kaj funkcio. Buchholz [D]: MZ-Verlag. 1a eld. 1993, 128 p. ISBN 3-89240-078-4.

Interesa ankaŭ por terminaristoj estas tiu enkonduko al anatomio. Celanta la ĝeneralan publikon la aŭtoro penis esprimi sin laŭeble „kompreneble“ tamen fake korekte. Vaste li klopodis eviti tro sciencajn terminojn kaj klarigi bazajn funkciojn de la homa korpo en (relative) facila lingvaĵo - kaj laŭ nia laika kompreno sukcesis pri tio. Sed tion profunde prijuĝi nur povas fakulo.

Imitinda ŝajnas al ni ankaŭ lia kritika pritrakto de persone neŝatataj, sed PIV-aj aŭ alifontaj terminoj. Ilin li uzas en la teksto, tamen atentigas en «rimarko por fakuloj» pri liaj termino-preferoj (mitokondro/mitoĥondro anstataŭ mitokondrio de la Medicina Terminaro, epitelo anstataŭ la PIV-a epitelio).

Forme la libro ĉiuaspekte estas moderna kaj laŭ hodiaŭa merkata nivelo: Multaj klaraj ilustraĵoj, mallonga dorsa prezento de verko kaj aŭtoro, ISBN-numero ktp., „akcesoraĵoj“ bedaŭrinde ne jam memkompreneblaj en la Esperanta libro-merkato.

Kiel precipajn terminarajn fontojn Schicke citas PIV, Esperantan Bildvortaron <EB> kaj la UMEA-terminaron de 1979 <EaMed>. Jen listeto de pliaj medicinaj kaj parencaj fontverkoj terminaraj (nekompleta):

- 1989a Li, Kexi/Albault, André. Anatomia Nomenklature. Latina, Angla, Franca, Esperanta, Ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo.
- 1989b Bertin, Christian. Sukrado kaj tujaj flegoj. Cesson-Sevigne.
- 1980 Hoyer, Gerd/Hoyer, Uta. Ärztlicher Dolmetscher. [271 bazaj

- kuracistaj demandoj en 17 lingvoj, inter ili ankaŭ Esperanto]. Leipzig: Johann Ambrosius Barth. 2a eld.
- 1979 Hradil, Josef (komp.). Esperanta Medicina Terminaro. s.l.: Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA). Repr. Prago: Ĉeĥa Esperanto-Asocio 1982.
- 1971 Schreuder, J.Th.R. / Diatlowicki-Tobi, A. Geriatrio kaj ĝenerala zorgo por gemultjaruloj.
- 1970 Zivago, R. (komp.). Atombomba malsano: facila enkonduko por laikoj. Hiroŝimo: Hiroŝima Rondo Harmonia.
- 1964 Nishi, Seiho. Nia korpo: anatomio kaj fiziologio de la homo por laikoj. 2a eld.
- 1963 Kato, Seiiĉi. Terminaro oftalmologia. En: Lernolibro de Oftalmologio. 2a eld.
- 1962 Kato, Seiiĉi. Vortoj Uzataj en Medicino.
- 1961 Meyboom, F. Quaestionarium Medicum. [17-lingva].
- 60aj Scolnik. Kiel kuracas la naturista medicino. S.j.
- 1932 Briquet, M. Esperanta Teknika Medicina Vortaro. Bruselo: Internacia Medicina Revuo.
- 1930 Hermesa Rondeto. Seslingva Vortareto de Medikamentoj laŭ Japana Farmakopeo. [eo, la, ja, de, en, fr].
- 1922 Ojida/Sata. Latino-Esperanta-Japana Anatomia Terminaro. 2a eld. 1924.
- 1913 Wunsch, W. Pri varmokulturo. Dresden: Ader & Borel. BIL 4657.
- 1906 Bouchard, Charles (red.). Anatomia Vortaro Kvarlingva. [la, fr, en, eo]. Paris: Hachette. BIL 4980a.

Por pliaj malnovaj verkoj vd. BIL 2758-2759, 4641-4668, 5026a, 5027.

Politika ...

Maul, Stefan (ed.). Deklingva Manlibro pri Politiko. Eo, Eo, Zh, Fr, De, Es, Ja, Nl, Pt, Ru. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo 1994, 7 p. kaj 460 kolumnoj. ISBN 90-71205-50-9.

La verkon iniciis la iama redaktoro de «Monato - internacia magazino sendependa» en 1986 pro siaj spertoj pri lingvaj problemoj de kunlaborantoj de tiu publikigaĵo. Li trovis 16 aŭtorojn el deko da landoj, kiuj verkis difinojn, ekzemplajn frazojn kaj tradukojn en la nomitajn lingvojn de enskribo-titoloj kiel «konsili, konsilio, Konsilio de Eŭropo, konspiri, konstitucio, konsulo» (p. 222), do de terminoj, kiuj estas (ankaŭ) uzataj en kunteksto de pripolitikaj raportoj. La plej granda problemo je tia verko certe estas iel krei unuecan tuton kaj enhance kaj lingve. Tre diversaj estis la kontribuoj de la kunlaborintoj je longo, detal-riĉo, lingvo-uzo kaj stilo, sed ankaŭ pro politika opinio kaj ideologio. Pri multaj detaloj oni certe povas diskuti. Tre malfacilan redaktan taskon do sinjoro Maul devis solvi. Ĉu sukcese, la uzontoj mem, do espereble ankaŭ vi, devos decidi.

Terminologia ...

Eichholz, Rüdiger (trad.). Esperanta provtraduko de International Standard ISO 1087. s.l. [Bailieboro (CDN)]: s.i. [la tradukinto], s.j. [1993], 20 p. Havebla de Rüdiger Eichholz, Bailieboro, Ontario, Kanado, KOL 1BO.

La normo, kiu estas preparita de la Teknika Komitato ISO/TC 37, nuligas kaj anstataŭas la ISO Rekomendon R 1087:1969, de kiu ĝi konstituas teknikan reviziaĵon. Esperanta traduko de tiu normo estis jam registrita en Pekoteko

=====

(85/287-85/381) same kiel la revizia labordokumento (86/001-86/106). Jen do la plej aktuala versio de tiu internacia dokumento en Esperanta traduko. Preparinte ĝin sinjoro Eichholz konstatis ambiguecon de la Angla/Franca originalo (plursenca difino de «terminology / terminologie»). Jen frapa ekzemplo, kiel Esperanto pro sia klara strukturo povas multon kontribui al ĝenerala terminara laboro.

4 terminaraj projektoj

Aŭstralazia ...

Sinjoro Brian Fox, 634 South Titirangi Road, Auckland 1007, Nov-Zelando, prezidanto de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio nuntempe laboras super kvara eldono de Aŭstralazia-Esperanta Vortaro per IBM-kongrua komputoro (3,5-colaj aŭ - prefere - 5,25-colaj diskedoj).

Aŭtomobilista ...

De doktoro Bormann, Hamburgo, Germanujo, ni danke ricevis la malneton de «Teknika Aŭtomobil-Vortaro». Ĝi havas longan historion spureblan ĝis la komenco de la 70-aj jaroj, kiam aperis ĝia nukleo kiel aŭto-terminareto de la Itala firmao FIAT. Iam oni planis aperigi ĝin ĉe la Nederlanda eldonejo Kluwer, kiu ankaŭ prizorgis la multlingvan Internacian Komercan-Ekonomikan Vortaron (IKEV). Tiu projekto tamen ne realiĝis. En 1985 la originalo iris al Angelo Todorov, por ke li publikigu ĝin en Bulgarujo. De tiam oni nenion plu aŭdis de ĝi. Traserĉanta la kelon de sia domo, d-ro Bormann nun retrovis (teknike tre malbonan) kopion de la tajpita manuskripto.

Ĝi ampleksas pli ol 6100 terminojn laŭ jena tipo:

- 5836 ventŝirmilfostgarnaĵo, intern - [tiel!]
a windshield pillar trim, inner -
f garnissage de montan intérieur de pare-brise
g Windschutzscheibesäule [tiel!], innere Verkleidung der -
h montante de parabrisas, revestimiento interior de -
i
n windschermstijl, binnenbekleding v.g.-

Jam nur tiu ekzemplo montras ecojn kaj mankojn de la terminaro: sep-lingva (Esperanto kaj Angla, Franca, Germana, Hispana, Itala kaj Nederlanda), sen difinoj, sen desegnoj. Bazo ne estas nocioj, sed etno-lingvaj (kiuj?) terminoj. Multaj eraroj en la etno-lingva parto (se entute, devus esti Windschutzscheiben-säule, probable tamen tute alia termino), tre malbona stilo de la Esperantaj terminoj („ventŝirmilfostgarnaĵo“). Malgraŭ ĉio: Jen manuskripto de 282 paĝoj en formato A5 kun multaj interesaj terminoj. Ĉu inter niaj aktivuloj ne estas iu(j), kiu ŝatus repreni la taskon kaj helpe de ĝi prepari (multe pli malgrandan aŭ kun malpli da lingvoj) aŭtomobilan vortaron laŭ la modelo de Pekoteko? Interesatoj skribu al la redaktanto de Terminoteko.

Briĝa ...

La konata Esperantisto-juristo d-ro Ralph Harry, 319 Bayview Gardens, 36-42 Cabbage Tree Road, Bayview, NSW 2104, Aŭstralio, ellaboris krom juran (vd. malsupre) ankaŭ terminaron pri la kartludo briĝo per Mekintoŝ-komputoro kaj la tekst-programo Microsoft Word [laŭ informo de d-ro Broadribb, Aŭstralio]. Ni klopodos akiri ĝin kaj prezenti al vi.

Ĉeĥa ...

Mgr. Zdeněk Hr_el, Botanická 28, CZ-602 00 Brno, Ĉe_ujo, laboras super po_vortaro Ĉe_a-Esperanta kaj Esperanta-Ĉe_a. Vortaristoj interesi_antaj pri sperto-inter_an_o skribu al li.

Ekonomika I ...

Sinjoro YAMASAKI Seikô, J-185 Tôkyô, KOKUBUNZI Higasi Koigakubo 3-18-12, Japanujo, kiu jam prizorgis ekonomikajn terminojn en «Manlibro pri Politiko» (vd. ckl. 6, p. 2 kaj nian supran recenzeton) kaj aktivis en Japana Esperanto-Instituto dankinde sendis liston de la unuaj cent ekonomikaj terminoj, kiujn li intencas difini kaj trakti laŭ la Pekoteko-sistemo. Ni esperas, ke ni baldaŭ povos raporti progresojn sur tiu kampo.

Ekonomika II ...

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF), Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgujo, per sia organo «La Merkato», n-ro 43 de januaro 1994, p.3 serĉas posteulon por la posteno de kunordiganto de terminara laboro sur ekonomia kampo. «[U]nu el la elstaraj taskoj de .. faka asocio estas la [E]sperantigo de nove aperintaj terminoj de tiu fako kaj rezulte el tio la eldono aŭ ĝisdatigo de fakvortaroj», «La Merkato» skribas. La terminara laboro de la ekonomiistoj nuntempe stagnas pro la demisio de sinjoro Hans Wiersch.

Eŭska ...

Arana, Aitor, Eŭska-Esperanto-Eŭska Vortaro (aperonta).

«eŭska kverko» n-ro 2 (aprilo 1993) de la Grupo Esperantista, Barreukale

Barrena 7-1, E-48005 Bilbo informas, ke la aŭtoro «ĵus pretigis ampleksan dulingvan vortaron, kiu baldaŭ estos disponebla por ĉiuj eŭskoj kaj esperantistoj. Kiel ponto inter la plej antikva lingvo el Eŭropo kaj la plej nova, ... ĝi estos mejloŝtono por ambaŭ minoritataj kulturoj.»

Al nia letero ni bedaŭrinde ne ricevis respondon. Ĉu iu leganto scias, ĉu la verko intertempe aperis?

Frazeologia ...

Hans WIERSCH k.a., Parolturnaro Germana-Esperanto, 400 p., kopiita versio 60 DM ĉe Hans und Kerstin Wiersch, Tilsit-Str. 39, D-73642 Welzheim, Germanujo

Sinjoro Wiersch, konata aktivinto en la kadro de la ekonomia kaj komerca fakgrupo IKEF, tie ĉi prezentas al ni verkon el la ĝenerala lingvaĵo: Ĉ. 20.000 Germanaj proverboj, idiomoj, parolturnoj kun la Esperantaj tradukoj.

Pri la parolturnaro verkis kvin Germanaj kaj Aŭstraj Esperantistoj dum 10 jaroj. Nun oni serĉas eldoniston, kiu pretas financi kaj presi la libron. Intertempe fotokopiita versio jam estas havebla ĉe la supra adreso. (Laŭ informo en Esperanto Aktuell 1994/1,p.5).

Gaela ...

«Monato» 11/1993, p.21 informas, ke «[b]aldaŭ aperos esperanta-irlandgaela-esperanta vortaro, kompilita de Breandán 'O Mearáin». Laŭ la sama fonto jam aperis eksperimenta (Skota-Gaela) «Vortaro Gaela/ Esperanta/ Gaela» de Hugh Martin, akirebla ĉe Esperanto-Asocio de Britio, 140 Holland Park Avenue, Londono, Britujo, W11 4UF por 6 pundoj plus afranko.

Bedaurinde EAB ne respondis al nia menda letero.

Geografia I...

Sinjoro Eŭgeno A. Davkaev, Box 597, P-61, St. Peterburgo, R-197061, Rusio, komputor-reta adreso pal@softart.spb.su, membro de Rusia Geografia Societo, interesiĝas pri geografiaj terminoj precipe de la montaro. Li en 1993 jam kolektis ĉ. 400 terminojn en Germana-Esperanta-Rusa kiel ASCII-teksto laŭ la komputora sistemo MS-DOS kaj serĉas kontakton al terminaristoj-geografistoj, kun kiuj li povos diskuti tradukon kaj signifon de iaj terminoj kaj aldoni Anglajn ekvivalentojn por kompletigi kaj plivastigi la terminareton. Volonte li ankaŭ enigis pliajn lingvojn, se li trovas kapablajn kunlaborantojn. Ni jam peris la kontakton al doktorino Schwarcaite, kiu same laboras pri geografia terminaro.

Geografia II ...

Sinjorino Schwarcaite estas docenta doktoro de geografiaj sciencoj ĉe la universitato de Vilniuso, Litovujo. Ŝi finis manuskripton de dek-lingva terminaro pri ĝenerala kaj socia geografio (numero de la terminoj nekonata). La verko ekzistas manskribite sur folioj kaj slipoj. La planita eldonado ne okazis, ĉar la Litova eldonejo pro la nuna malfacila ekonomia situacio en la lando estis likvidita. Same ne ekzistas ebleco klavi la materialon per komputoro en la universitato, ekz. laŭ la formo de Pekoteko kiel proponite de ni. Jen niaj lastaj informoj de la mezo de 1993.

Espereble la situacio intertempe stabiligis. Sekvas specimena karto afable sendita de d-ino Schwarcaite (la Litovan kaj Rusan ni pro teknikaj kaŭzoj tie ĉi anstataŭigas per «...»):

1246 E... [Litova termino] (ezers) -

... [Litova difino] [Latva term.]

r - ... [Rusa termino]
p - jesioro [Pola termino]
e - lake [Angla termino]
d - See [Germ. termino]
f - lac [Franca termino]
i - lago [Itala termino]
es - lago [Hisp. termino]
E - lago [Esp-a termino]

Volonte ni aŭdus pri la plua evoluo de la projekto. Proponojn pri eldon-eblecoj kaj kunlaboro bv. sendi al d-ino Ieva Schwarcaite, str. Viršuliškiu 33-6, LIT-2056 Vilnius, Litovujo, aldonante du irk.

Germana ...

Krause, Erich-Dieter, Wörterbuch Esperanto-Deutsch.

Ulrich Matthias informas en «Esperanto Aktuell», la revuo de Germana Esperanto-Asocio, n-ro 1994/1, p. 10 ke la „frato“ de la ĵus reeldonita „granda Krause“ Germana-Esperanto (vd. nian recenzeton supre), nome la jam de longe atendita vortaro Esperanto-Germana estus preta kaj „nur“ atendus eldoniston. Bedaurinde la historio de la Esperanta vortariko estas plena de ekzemploj, ke tia „nur“ povas ankoraŭ prezenti grandan obstaklon. Ni esperu, ke ni baldaŭ povas diskonigi la aperon de tiu grava vortaro.

Historia ...

En «Monato» 1993/6, p. 8 ss aperis raporto pri Lihtenŝtejno kun i.a. „konciza historia superrigardo“, kiu devigis la aŭtoron trovi taŭgajn Esperantajn terminojn por historiaj nocioj kiel «Heiliges Römisches Reich Deutscher Nation», «Rheinbund», «Deutscher Bund» k.s. La trovitaj solvoj estas niaopinie tute ne kontentigaj. Evidente la aŭtoro eĉ nek kontrolis en PIV, kie li ja trovas bonan terminon ekz. por

la lasta nocio, nek havas klaran bildon de la jura-historia enhavo de la nocioj. La artikolo en «Monato» tamen bone ekzempligas la neceson de iom stabila Esperanta terminaro de gravaj historiaj institucioj kaj eventoj. En Perkomputora Termino-Kolekto ni jam proponis areton de tiaj nocioj, ekz. «Bura milito», «Aliancana Kontrolkonsilio», «Otomana Regno», «Aŭstra kronlando», «Versajla Traktato», «Sankta Alianco» ktp. La supre menciitaj tri nocioj ni tradukis per:

- {eo1} **Sankt/a Rom/i/a Ĝerman/a Imperio**
- {eo2} **Sankt/a Romi-German/a Imperio**
- {de1} Heiliges Römisches Reich *n* deutscher Nation
- {en1} Holy Roman Empire
- {en2} Holy Roman Germanic Empire
- {es1} Sacro Imperio *m* Romano Germánico
- {fr1} Saint Empire *m* Romain Germanique

89 / p b 1 1 3 9

Rim: ej (92-04-05): Laŭ mia opinio en la imperio troviĝis nur Germanaj kaj ne Ĝermanaj popoloj. «92-04-05»

- {Eo1} **German/a Konfederaci/o** *a
- {De1} Deutscher Bund *m*
- {En1} German Confederation
- {Es1} Confederación *f* germánica
- {Fr1} Confédération *f* germanique

De 1815 ĝis 1866 konfederacio (89/pb-1036) de la unuopaj Germanaj ŝtatoj (komence (1815) 35 princlandoj kaj 4 liberaj urboj, fine (1866) 28 kaj 4). Sola konfederacia organo estis la Konfederacia Asembleo (ankaŭ nomita Konfederacia Dieto) en Frankfurto ĉe Majno. Fondita dum la → Kongreso de Vieno (89/pb-1034) en 1815 ĝi disrompiĝis post la milito inter Prusujo kaj Aŭstrujo en 1866. *c

Fon: *a PIV →konfederacio; *b HAE; *c pb;

89 / p b 1 0 3 5

Rim: «90-11-02»

- {eo1} **Rejn/a Konfederaci/o** *a
 - {de1} Rheinbund *m* *a*b*c
 - {en1} Confederation of the Rhine *b
 - {es1} Confederación *f* del Rin *b
 - {fr1} Confédération *f* du Rhin *b*c
- Konfederacio de sud- kaj okcident-Germanaj ŝtatoj (Bavarujo, Virtembergo, Badeno, Heslando-Darmstado k.a.), fondita je 1806-07-12 sub la protektado kaj dominado de Napoleono I-a. La ÷o kaŭzis la baldaŭan finon de la → Sankta Romi-Germana Imperio (89/pb-1139). Post la malvenko de Prusujo ankaŭ Saksujo kaj la malgrandaj mez- kaj nord-Germanaj princlandoj aliĝis al la ÷o. Dum la liberigaj militoj kontraŭ Napoleono la ÷o dissolviĝis en 1813. *a laŭ *c

Fon: *a pb; *b HAE; *c dtv-lex;

92 / p b 3 7 5

Rim: «92-05-12»

Kiu deziras kunverki «terminareton de historiaj esprimoj»? Provizora listo de tradukindaj terminoj haveblas de la redaktanto.

(Tiu teksto aperis - mallongigite kaj lingve mis-,korektite“ - kiel letero de leganto en Monato 1993/8, p. 7.)

Itala ...

Eldonejo Sonorilo, Doornstr. 22, B-2610 Wilrijk, Belgujo atendas grandan Italan vortaron Itala-Esperanto de Stefano La Colla kaj Carlo Minnaja kun ĉ. 1600 paĝoj eldonota de Eld. CoEdEs. en julio 1994. Laŭ informo de doktoro Minnaja, Università di Padova, Dipartimento de Matematica Pura ed Applicata, Via Belzoni 7, I-35131 Padova, Italujo, e-poŝto «minnaja@pdmat1.unipd.it» mem, la vortaro enhavos 50.000 kapvortojn kaj estas prilaborita per Mekintoŝ-komputoro, sistemo 7. Ni dankas pro la

letero kaj kore petas doktoron Minnaja raporteti pri la progreso de la laboroj.

Jura ...

Laŭ informo de d-ro Broadribb, Aŭstralio kompletigis eksambasadoro Ralph Harry (adreso supre, je «Bri_a ...», p.15) juran terminaron en 1993. S-ro Harry i.a. estis kuntradukinto de la UN-ĉarto (kun Svane kaj Lapenna), kontribuinto al «Manlibro pri Politiko» (vd. tiun ĉi ckl.) kaj verkis jurajn artikolojn. Ni petas sinjoron Harry sciigi al ni pliajn detalojn por venonta cirkulero.

Kmera ...

Sinjoro Chhim Sokha, B 17/8, krom 3, Soviet Street, Sangkat Sras Chork, Khan Doun Penh, Phnom Penh, Kamboĝo laboras pri Esperanto-Kmera vortaro. Ĉiu kontribuo estas bonvena, precipe komputoro estus granda helpo. [Laŭ informo de Horst Gruner en Esperanto aktuell 8/1993, p.8]. La sola ĝisnuna Kamboĝa vortaro, pri kiu ni scias, estas la Esperanto-Kamboĝa vortaro de C. Sok Bun kaj H. Sreang Hean, Rotterdam: UEA. 148 p. [18,- guldenoj ĉe UEA]. Bedaŭrinde sinjoro Chhim ne respondis al nia letero. Sribante bv. nepre aldoni du irk.

Komputora I ...

Sinjoro Michael Behr, Koburger Str. 83, D-04416 Markkleeberg, Germanujo, sur diskedo sendis al ni sian «Inventaran Terminaron pri Komputado», parton I «Sistemoj kaj funkcioj de la komputado», 200 nocioj kun difinoj kaj komentoj, Eo, En, Fr, Ru (per Latinaj literoj transskribita), stato 1989-06-11, kaj samforman parton II «Elementoj de matematiko kaj logiko», same enhavanta 200 nociojn, stato 1988-07-22. La

originalo uzas la programon «dBase» por IBM-kongruaj komputoroj, sed kompreneble ankaŭ ekzistas ASCII-versio kaj konverto al Pekoteko. Bedaŭrinde sinjoro Behr ne daŭrigas la laboron pri la terminaro.

Ĉu iu el la iama kunlaborintoj ŝatus repreni la taskon? Ĉu novaj interesatoj troveblas? Dankon pro viaj reagoj.

Komputora II ...

Doktoro S.B. Pokrovskij, str. Tereškova 28-32, Novosibirsk R-630090 Rusujo, laboras super «Komputika Leksikono» Esperanto-Angla. Jen eltiraĵo el ĝia komenco (la originalo uzas alian skribon kaj formaton kaj kelkajn specialajn simbolojn tie ĉi ne reproduktitajn sed indikitajn per «#»):

A: **1** la unua litero de la alfabetoj angla, Ea, latina **2** deksexuma cifero kies dekuma valoro estas 10 (A able) **3** renversita A estas la universala kvantoro **# 4** laŭ PIV, en la tradukaj notoj de tiu Leksikono, A estas uzata kiel mallongigo de „angle, la angla lingvo“.

→ abacus: abako

abak o: «kalkulilo, konsistanta el globetoj trairitaj de stangetoj, sur kiuj ili estas ŝoveblaj, kaj uzita antaŭ la alprenado de la arabaj ciferoj, cetere ankoraŭ nun uzata en Ĉinujo ktp kaj en elementaj lernejoj»[#]. A abacus

→ ABEND, abnormal end: misfino

abol sign o: stirsigno, malvalidiganta la ĵus ricevitan signon aŭ grupon de tiaj signoj; ĝia Askia kodono [tiel!] estas 24. ...

A CAN, cancel

abon^oi (komputilretan poŝton): uzulo [tiel!] de komputilreta poŝto povas aniĝi al ... A subscribe

→ abort: ĉesigo (abortigo)

abs: operacio por determini la absolutan valoron de nombro. En multaj programlingvoj (ekz PASCAL) ĝi estas uzata en la funkcia notacio: **abs(x)**; en aliaj (ALGOL-68, ADA) abs estas unuloka operacisigno.

La terminaro do estas ordigita laŭ Esperantaj enskribo-titoloj kun Esperantaj difinoj kaj tradukoj al la Angla. Enŝovitaj en la ĝustan alfabetan lokon estas Anglaj-Esperantaj termin-grupoj, signitaj per enŝova spaco, la simbolo «→» kaj kursiva skribo de la Anglaj terminoj. Tiu sistemo havas la avantaĝon, ke ekzistas nur unu (dulingva) vortara listo, en kiu oni povas serĉi aŭ surbaze de la Esperantaj aŭ de la Anglaj terminoj. La Angla indekso do estas kvazaŭ intermetita en la Esperantan difinan parton. Ŝerĉanta surbaze de la Angla termino oni tamen devas foliumi duan fojon por la Esperanta enskribo-titolo, ekz. la enskribo «→abort» montras al «ĉesigo» kelkajn paĝojn pli poste, kie oni trovas la difinon de tiu nocio.

Indikoj pri radik-limoj (faritaj per spacetoj «abol sign o»), pri gradoj de oficialeco («abon°i») kaj pri fontoj («PIV») kompletigas la verkon.

Prijuĝi ĝiajn lingvaĵon, kompletecon kaj koherecon surbaze de nur unu paĝo ne eblas. Strange tamen ŝajnas al ni la vortoj «kodono» (kodaĵo!) kaj «uzulo» (uzanto!), uzataj sur la unua paĝo. «absoluta valoro de nombro» el la difino de «abs» mankas inter «abs» kaj «absolute error».

La Komputika Leksikono estas skribita per la programo «LaTeX». La malneto estas havebla de la aŭtoro sur diskedo aŭ per komputara reto. Pliaj enskriboj estas en preparo.

Komputora III ...

Pfeiffer, Daniel k.a. Angla-Esperanta Komputa & informadika Vortaro. Stato 93-01-06. Ĉ. 670 vort-paroj Anglaj-Esperantaj, sen difinoj.

Jen terminareto, en kiu svarmas enskriboj kiel jena pri «modemo»:

modem = modulator/demodulator: modulilo-malmodulilo, gemodulilo (tiel!).

En la nuna formo ĝi nepre bezonas poluron. Jam la metodo (vort-paroj sur la bazo de la multsignifa Angla!) estas tre duba. Multegaj terminoj estas uzata en alia senco ol difinita en PIV, eĉ bazaj principoj de termin-farado ŝajne ne konataj. Domaĝe ke ankoraŭ en Esperantujo oni ne kapablas lernocele kunlabori ĉe pli evoluitaj projektoj (vd. ekz. la aliajn projektojn pri komputara terminaro) kaj anstataŭe perdas valoran energion per propra projekto. Detalan kritikon vd. en Cirkulero EP 93/8 de 93-11-19 havebla de la Akademio de Esperanto, Sekcio pri Fakaj Vortaroj, R. Eichholz, Bailieboro, Ontario, Kanado, KOL 1BO.

Komputora IV ...

Kalckhoff, Pick. Komputada Baza Terminaro. München 1985. Parta elektronika versio de la libroforma verko enhavanta nur la parton Esperanto-Angla.

Fari elektronikan version de libroformaj terminaroj ĝenerale estas salutinde. Dezirinde estus, se la nun maŝin-legebla formo instigus al revizio kaj pli-ampleksigo de la „veterana“ terminaro de Kalckhoff kaj Pick, kiu jam ne plu respegulas la modernan lingvo-uzon en la rapide ŝanĝanta kampo de komputoriko.

Komputora V ...

Weichart, Martin. Bazaj komputilaj fakvortoj (priskribo sekvos)

Komputora VI ...

Jelenc, Pierre. Komputila vortaro Esperanta Angla Franca. Havebla per la e-poŝta adreso «rcpj@panix.com».

Medicina ...

Sinjoro Harald Schicke, Postfach, D-21244 Buchholz, Germanujo, naturkuracisto, eldonisto kaj aŭtoro, i.a. de «La korpo de la homo» (vd. tiun ĉi ckl. p. 12) planas eldoni anatomian atlason en kelkaj (maksimume kvin) lingvoj, kies bazo estu Esperanto. Tiucele li serĉas kunlaboron de kompetentuloj el lingvokomunumoj, kiuj same ne jam disponas pri tia verko. Ili traduku la terminojn en la respektivajn lingvojn. Termina bazo estu la verko «Anatomia Nomenklatur» de Li kaj Albault, Pekino 1989.

Kontraste al tiu verko la planata ankaŭ enhavu ilustraĵojn. Multajn sinjoro Schicke jam kolektis, sed pliaj estas nepre bezonataj. Kiu helpos?

Psikologia ...

Akademiano d-ro Broadribb intencas verki terminaron pri psikologio, pli ĝuste pri psikiatrio kaj psikanalizo laŭ la sistemo Pekoteko. Ni peris la kontakton al sinjoro Welger, Germanujo, kiu same interesiĝas pri psikologia vortaro (vd. ckl. 8 p. 14-15) kaj esperas, ke kune la fakuloj bone progresos. Jen aldono al nia eta kolekto de pripsikologiaj temoj en ckl. 8:

Landmark, M. Infanpsikologio. Elektitaj temoj. Liège 1978, 10+188p.

Ŝaka ...

Preskaŭ ĉiujn ĉ. 320 terminojn de la ŝaka terminaro en Terminoteko tradukis al la Germana kaj Angla sinjoro Dan Maxwell. Multajn difinojn li plibonigis. Petu de la Terminoteko-redaktanto.

Slovena ...

Iama advokato kaj registara konsilisto Svobodan ZLATNAR, Celovška 145a, SLO-61000 Ljubljana, Slovenujo, motoras por Slovena vortaro. En decembro 1992 li submetis laborprojekton al la Ministerio pri sciencoj kaj teknologio de la Respubliko Slovenujo por verkado de Slovena Esperanto-vortaro fare de la filozofia fakultato, katedro pri Romanaj lingvoj, de la universitato de Ljubljano. Per tiu partopreno en oficiala konkurso oni esperas akiri minimumajn financajn rimedojn kaj starigi daŭrajn rilatojn inter la Esperantistoj kaj la fakultato. En junio 1993 sinjoro Zlatnar skribas al ni, ke «ĝenerala faka konsento [de la universitato] por starto de la laboroj ligitaj al plena Esperanto-slovena kaj slovena-esperanta vortaro estas akirita». Bedaŭrinde de tiam ni nenion aŭdis pri la projekto kaj la klopodoj akiri financajn rimedojn.

La vortaroj enhavu almenaŭ ĉiujn radikojn de PIV kaj estu farota per modernaj komputaraj rimedoj. Ni jam sendis diversajn elektronikajn vortarajn dosierojn al Slovenujo. Laŭ nia instigo sinjoro Eichholz senkoste sendis la trivoluman terminaregon Plena Pekoteko por plie subteni tiun laŭ nia scio nuntempe plej ambician projekton de dulingva Esperanto-vortaro. Plia helpo

daŭre estas bonvena. Interesatoj bv. skribi rekte al sinjoro Zlatnar.

La solaj Slovenaj vortaroj konataj al ni estas la Esperanto-Slovena vortaro de Otmar Avsec el la jaro 1957 kaj la vortaro Esperanto-Slovena kaj Slovena-Esperanto de la sama aŭtoro el 1972 (2a eld.). La vortaron de 1957 ni volonte akirus kaj petas la helpon de niaj legantoj. Ofertojn bv. sendi al la redaktanto.

niaj vortaristoj

En tiu nova rubriko ni ŝatus koncize prezenti al vi kelkajn el niaj nuntempaj Esperanto-vortaristojn. Tiuj prezentoj samtempe estu kontribuoj al iam aktualigita «Enciklopedio de Esperanto» kaj pro tio sekvas la modelon de tiu verko. Nian serion ni komencas per sinjoro Ebbe Vilborg, la aŭtoron de la fama «Etimologia Vortaro de Esperanto» kaj de Sveda-Esperanto Vortaro, kiun ni recenzetas en tiu numero. Sinjoro Vilborg laŭ nia peto afable donis informojn pri sia vivo kaj verko, pri kiuj ni sincere dankas al li.

Vilborg, Karl Ebbe

Svedo, filologo pri klasikaj lingvoj, docento pri Greka (Helena) lingvo en la universitato de Göteborg.
Naskita 1926-02-14.

- 1955 Doktoriĝo. Doktoriĝa tezo: Konstituo de nova tekstversio de la Helena romanverkisto Akilo Tacio.
- 1956 Fariĝis docento, poste specialisto pri la Micena dialekto de la Helena lingvo kaj verkis «A Tentative Grammar of Mycenaean Greek», vd. ankaŭ la liston de liaj verkoj.
- 1962 Proponita kiel vicprezidanto de la Akademio de Esperanto (AdE) dum ties privata kunsido dum la UK

en Kopenhago [EeP 668] kaj elektiĝo en la Akademio de Esperanto (AdE).

1979 Rezignas je rekandidatiĝo por la Akademio.

V. loĝis la tutan vivon en Göteborg escepte de tiuj periodoj, kiujn li trapasis en Romo ĉe la Sveda instituto kiel studento de arkeologio kaj esploristo pri filologio.

verkoj (elekto)

«La Espero, Svenska Esperanto-Tidningen» estas Sveda Esperanto-revuo, por kiu V. dum multaj jaroj recenzis.

- 1951 Pri „brogi“. En: Revuo Esperanto Internacia n-ro 552 (11) nov. 1951, p. 286.
- 1956 Pri Azorin, Ilustrita Vortaro de Esperanto [recenzo]. En: La Espero 2-3/1956.
- 1957 Sveda-Esperanto kaj Esperanto-Sveda Vortaro.
- 1958a Pri kelkaj manuskriptoj de la Longo-romano. En: Sciencaj Studoj, ISAE, Kopenhago 1958, p. 67 ss.
- 1958b Antikvepoka Esperanto. En: Nord Prismo 4/1958, p. 218 ss.
- 1961 Esperantigo de grekaj nomoj. En: Esperantologio II:2 (1961), p. 152 ss.
- 1962a La deĉifrado de la „skribo linia B“. En: Scienca Revuo XII:3-4 (1962), p. 98 ss.
- 1962b Pri Simpozio pri ata-ita [recenzo]. En: La Espero 2-3/1962.
- 1965 Kun V. Setälä, C. Stöp-Bowitz: Esperanto - moderna lingvo. Studo baze de la Fundamento. Helsinki [SF]: Fondumo Esperanto.
- 1966 Tekstkritiko. Kun popono de esperantaj terminoj. En: Scienca Revuo XVII:2 (1966), p. 43 ss.

- 1967 Pri «Vojaĝo inter la tempoj»
recenzo]. En: La Espero 3-
4/1967.
- 1968 Pri Tauli, Introduction to a
Theory of Language Planning
[recenzo]. En: Heroldo 13/1968.
- 1971 Pri Plena Ilustrita Vortaro
[recenzo]. En: La Espero 4/1971.
- 1973 La partcipa problemo en la
Akademio. Dokumentaro kom-
pilita kaj komentita de E.
Vilborg. Göteborg [S]: Lingva
Komisiono, 138 p.
- 1975 Supplement till Svensk-
Esperantisk ordbok de Jansson-
Lindén-Gerdman (eldonita en
1934).
- 1983 La etimologio de la numeraloj en
Volapük. En: Dialogo n-ro 3(41),
p. 56-58.
- 1984 Viroj: nuloj aŭ uloj. En: La
Espero 1/1984.
- 1988 Lilla Esperanto-ordboken. Dua
eldono. Malmö [S]: Esperanto-
förlaget. ISBN 91-85288-15-2.
- 1989 Etimologia Vortaro de Esperanto.
Volumo 1: A-D. Malmö [S]:
Eldona Societo Esperanto.
- 1991 Etimologia Vortaro de Esperanto.
Volumo 2: E-Ĵ. Malmö [S]:
Eldona Societo Esperanto.
- 1992 Sveda-Esperanto Vortaro.
- 1993 Etimologia Vortaro de Esperanto.
Volumo 3: K-M. Malmö [S]:
Eldona Societo Esperanto.

1967 ĝis 1976, n-roj 1-14

Fokuso. Interlingvistika cirkulero:
bibliografio kaj komentoj pri aktualaj
interlingvistikaj demandoj. La bulteno
eldonita de V. prezentas laŭpove
kompletan bibliografion de ĉiuj verkoj
(libroj, broŝuroj, artikoloj) pri la inter-
nacilingva problemo kaj pri esper-
antologio.

info-miks

Analiza Skolo ...

Sinjoro Helmut Welger, Bismarckstr.
28, D-35037 Marburg, Germanujo,
advokato kaj diplomita psikologo, verkis
German-lingvan studon «Die Analiza
Skolo und die Logik», kiu kritikas la
metodon de „logika“ konkludado laŭ la
doktrino de tiu skolo. Por terminaristoj
la diskuto estas interesa, i.a. pro la
prezentitaj «Principoj de lingvo-
planado», la diskuto pri «doktrino /
doktreno» k.a.

Lernprograma I ...

Jareb, Ottmar. PC-Esperanto versio 2.0
por PC/XT, PC/AT VGA/EGA.

Jen komputora programo, kiu en la Ger-
mana informas pri aspektoj de Esperanto
(ekesto, uzebleco, lingva strukturo, ktp.)
kaj per kiu Germanlingvanoj povas trejni
lernendajn Esperantajn vortojn
(„vokablojn“ laŭ malnova ne-PIV-a
vorto el Butin/Sommer).

Otmar Jareb, Blücherstr. 42, D-71116
Gärtringen, Germanujo, ĉ. 10 DM.

Lernprograma II ...

Reinhard Pflüger, Jakob-Trumpfheller-
Str. 6, 68167 Mannheim, Germanujo
ofertas komputoran Esperanto-kurson
por Germanlingvanoj por la sistemoj de
«Amiga» kaj «IBM». Ambaŭ versioj
kostas po 5 DM plus ekvivalento de 1
USD (ŝarvo-pago), do ĉ. 7 DM kaj estas
haveblaj sur (prefere) 3,5-cola disketo.

Windows-a I ...

Tri Truetype-literaroj, nome Romano,
Koncize kaj Voluto (ĉiuj en diversaj

formoj kiel normala, dika, oblikva ktp.) por Windows 3.1 estas haveblaj surdiskede kune kun specimena WinWord-dokumento por 20 DM ĉe Wolfram Diestel, Bauvereinstr. 3, D-04416 Markkleeberg, Germanujo, + 49-341-32 74 87. Sinjoro Diestel krome verkis programon «klavo», kiu ebligu la uzadon de Esperanto-literoj en ĉiuj programoj kaj dialogoj kaj kostas 15 DM, ĉio kune 30 DM. (Informo laŭ GEJ-gazeto 3/1993, p. 13 kaj 5/1993, p. 13).

Windows-a II ...

Komputila Rondo (Kompro; kp. Terminoteko 7, p. 7) ofertas TrueType-karakterarojn (TTF) kiuj sen helpprogramoj estas uzablaj de ĉiuj Windows-programoj kiuj subtenas TTF. Diskedo estas havebla ĉe Kompro kontraŭ 10,-DM. Mem adapti ekzistantan karakteraron oni povas per *Fontographer* kaj *FontMonger*. Priskribo aperis en «Kolekto 2 de interesaj artikoloj», same havebla ĉe Kompro. Ĝi enhavas ĉiujn metodojn iam prezentitaj en la Kompro-informiloj pri Esperanto-literoj sur DOS-, Windows-, Macintosh- kaj Atari-komputoroj.

Kompro, Jürgen Wulff, Bornkamp 12, D-22043 Hamburg, Germanujo; telefakso + 49-40-656 06 59; bultenejo + 49-40-689 61 10; elektronika poŝto kompro@-kaihh.hanse.de. [laŭ informo en Monato 1993/9, p.4, kp. ankaŭ la recenzon de Paul Peeraerts en Monato 1994/2, p.22]

Windows-a III ...

La redakcio de «Eventoj», pf. 87, H-1675 Budapest, Hungarujo ofertas kvar bazajn True-type literarojn por la versio 3.1 (aŭ pli posta) de tiu grafika programsistemo por IBM-kongruaj aŭ

Mekintoŝaj komputoroj. Mekintoŝ-uzantoj krome bezonas programon ebliganta la uzadon de diskedo formatita per IBM-komputoro. Abonantoj de «Eventoj» ricevas la literarojn sur 3,5 aŭ 5,25-cola diskedo kontraŭ pago de 10 guldenoj al la UEA-kodo ELLS-S aŭ la redakcia adreso de «Eventoj» [Laŭ Eventoj 37, p.3 (93-09-01)]. Kaj neabonantoj? Ili simple klopedu fari same (sen garantio de sukceso). [Laŭ redaktanto de «Terminoteko»].

Japan-revua ...

Numeron 1 (aŭgusto 1992) de nova revuo «Japana Esperantologio, Bulteno de Japana Esperanto-Instituto» afable alsendis sinjoro Yamasaki Seikō. La Japan- kaj Esperant-lingva publikigaĵo aperigas artikolojn tro sciencecajn aŭ longajn por la tradicia «Revuo Orienta» de la sama instituto. En la cit. numero aperis apud recenzoj kaj informoj tri studoj pri «Esperanto kaj Maŝintraduk-sistemo» kaj «Refleksivaj Esprimoj en la Pola Lingvo kaj Esperanto» (ambaŭ en la Japana kun bedaŭrinde nur tre magra rezumo en Esperanto). Sinjoro Yamasaki Esperante verkis «Terminologiajn Observojn» pri la problemoj korekte redoni en la Internacia Lingvo la nocion «aufheben» de la Germana filozofo Hegel. Sinjoro Yamasaki estas i.a. kunlaboranto de la projekto «Manlibro pri Politiko» <MpP> (vd. ckl. 6, p. 2) kaj de Perkomputora Termino-Kolekto kaj konata aŭtoro i.a. de la magazino «Monato». «Japanan Esperantologion» mendu de Japana Esperanto-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162, Japanio.

Forstista ...

Pri multlingva Vortaro de Forsta Fako (Lexicon Silvestre) kun ĉ. 1000 forstaj

nocioj ni jam raportis en nia ckl. 6, p. 2. Nun ĝia kunordiganto, d-ro Karl-Hermann Simon, ÖBBB, Alfred-Möller-Str., D-16225 Eberswalde, Germanujo, informas, ke la terminaro ja estas preta, sed mankas la rimedoj publikigi ĝin. La Bonna responda ministerio malakceptis projekto-proponon kun la „argumento“, ke Esperanto en tiu laboro estus tute malkonvena („abwegig“). Espereble la grupo ĉirkaŭ d-ro Simon ankoraŭ trovas solvon per mecenato aŭ ties moderna formo „sponsoro“ aŭ skemisme „sponsanto“. Ĉu iu povas helpi? Bv. rekte skribi al d-ro Simon.

Retaj kursoj

Laŭ informo de Derk Ederveen en «tejo tutmonde» <tt/1994/1(63),p.23-25> nun ekzistas tri enkondukaj korespondaj Esperanto-kursoj en elektronika formo en komputoraj retoj en la Angla, Franca kaj Germana. Entute aliĝus en du kaj duona jaroj pli ol 1.000 komencantoj. Ili laŭ <tt> povas daŭrigi lernadon per elektronika versio de la kurso «Gerda malaperis» de Claude Piron. Pliajn informojn je Derk Ederveen, kiu bedaŭrinde nur indikis sian retpoŝtan adreson: Fidonet: 2:283/323.7 -Internet: derk@saluton.hacktic.nl

PIVS-a

Detalan recenzon de Doug Portmann de la Suplemento de Plena Ilustrita Vortaro (PIVS), necese tuŝantan ankaŭ ĝeneralajn termino-kreajn problemojn enhavas «La Rikoltanto, Laŭokaza Esperantista Aktivula Informilo» de la «Cerealurbaj Esperantaj Amikoj», 3904 Beadle Lake Drive, Battle Creek, MI 49017-8214, Usono, en la numero de junio 1993. Leginda!

korektoj

Pluraj legantoj atentigis nin pri aĉa misliterumo de Franca termino en ckl. 8, p. 10 kaj aldonis plian etnajn terminojn. Ni pardonpetas kaj dankas pro la afablaj atentigoj. Jen la korektita (kaj espereble nun korekta) nocio-komplekso:

- {eo1} **ŝtop/iĝ/o** *a
- {eo2} **trafik/a ŝtop/iĝ/o** *b
- {de1} Stau *m* *b
- {de2} Verkehrsstau *m* *b
- {en1} traffic jam *b
- {en2} gridlock *US* *c
- {es1} embotigamiento *m* *b ??
- {fr1} embouteillage *m* *c*ĉ*d
- {it1} ingorgo *m* *c
- {it2} imbottigliamento *ĉ

Troa trafika denso sur strato aŭ aŭto-ŝoseo kaŭzanta longan vicon de starantaj aŭ nur malrapide antaŭirantaj veturiloj: *Ŝtoj de longo de 80 km en la 90aj jaroj ne plu estas raraj sur Germanaj aŭto-ŝoseoj dum ferikomenco.*

*b laŭ *a → radia ÷-informo
Fon: *a Traf,p15; *b pb; *c epp; *ĉ ca;
*d ys;

93 / p b - 004

Rim: «93-08-08»

reagoj

Sinjoro Epp, CDN → glosaro konteo

Sinjoro Cnudde, Fm → Francaj ekvivalentoj

«Precipe via intenco aperigi de tempo al tempo bultenon en kiu ni povus trovi la statojn de la laboroj fare de diversaj kunlaborantoj al pekotekoj, kuraĝigas min. Estas bone scii ke oni ne laboras sole.»

Edward Spitaels, Belgujo 93-11-28

=====

kiu helpos?

Antaŭ iom da tempo ni ricevis informon, ke sinjoro Martin Morris, 5 Larkfield Close, Hayes, Bromley, Anglujo BR2 7ES preparus Anglan-Esperantan vortaron. Bedaŭrinde sinjoro Morris al nia letero ne respondis. Eble ĝi ne atingis lin. Kiu konas lian aktualan adreson aŭ scias ion pri la projekto?

kiel uzi la respondilon por terminikaj diskutoj

(Bv. gardi tiun klarigon, kiun vi same bezonos por la venontaj cirkuleroj; pli detalajn klarigojn vi trovas en Plena Pekoteko 1985-1990, PP)

Unue legu la Terminoteko-komplekson, al kiu oni referencas. Signifas:

- {U1} Numero laŭ Universala Decimala Klasifiko bezonata por laŭfaka, sistema ordigo de la nocioj
 - {T1} Numero laŭ Terminum, datenbanko de la Kanada registaro
 - {eo1} Unua Esperanta termino kun indiko de la gramatikaj eroj *a*b
 - {eo2} Dua Esperanta termino *a*c
 - {de1} Etnolingvaj terminoj en Germana,
 - {en1} Angla, Franca, ktp. kun gramatika
 - {fr1} genro kaj eble pliaj informoj
- Difino de la nocio: *ekzempla esprimo en kursiva skribo*. *a
Fon: *a 1a fonto; *b 2a fonto; *c 3a fonto; [la asterikoj kun minusklaj literoj referencas al la supre uzataj]

89/nnn <- numero de Terminoteko

Rim: Rimarkoj kaj argumentoj. «dato de lasta prilaboro»

Pliajn klarigojn vi trovos en PP.

Poste respondu al la demandaro atente jenon:

respondilo

=====

Bv. sendi al

Bernhard Pabst, Südweg 42
D-53773 Hennef, Germanujo

=====

Via nomo kaj adreso en Latinaj literoj laŭ la intersekvo kutima en via lando (familian nomon bv. majuskligi)

haveblaj materialoj pri terminara laboro

A. Terminoteko-cirkuleroj:

- _____ 1. Fariĝu lingvo-observanto (stato 92-05-22)
- _____ 2. Usonaj subnutraĵoj (stato 92-07-05)
- _____ 3. Provregistriĝo de elektroteknika vortaro (stato 92-07-05)
- _____ 4. Printi Terminoteko-registraĵojn sen Letrikso –rekomendoj por komputorantoj (stato 92-06-16)
- _____ 5. Propraj nomoj el Sudafriko (stato 92-06-22)
- _____ 6. Esperanta terminara laboro en 1992 (stato 92-10-03)
- _____ 7. Ĉu terminika revuo, kaj kia? (ckl. stato 93-05-23)
- _____ 8. La milito de la majuskloj (ckl. stato 93-05-23)
- _____ 9. Germana indekso de Slipara Vortaro (ckl. stato 93--xx)
- _____ 10. Pekoteko kaj TEC (ckl. stato 94-10-01)

B. Publikigaĵoj de Pekoteko haveblaj nur de Esperanto Press, Bailieboro, Ontario, Kanado KOL 1BO, Tel. (705) 939-6088:

- ___ Dekunu Paroladetoj pri Pekoteko (tekstokajero US\$ 4.00, 2 kasedoj US\$ 6.00, sendkostoj US\$ 2.50)
- ___ Akademias Studoj 1984 US\$ 3.30

(Anonco)

Esperanto Press
Bailieboro, Ontario, Kanado, KOL 1BO
Tel.: (705) 939-6088

Mi mendas la 3 voluman verkon

___ Plena Pekoteko 1985-1990
(1816 paĝojn plus du respondiloj) je
prezo de US\$ 80.00 (DM 120.00).
Aldonu al tio US\$ xx.00 aŭ DM xx.00
por sendkostoj.

Ekvivalenton por la sumo de US\$ xx.00
mi pagos al la poŝtĝirkonto de R.
Eichholz, Bailieboro, Ontario, Kanado:
Hannover Konto 1173 68-306

Mia nomo:

Mia adreso:

Ricevon de _____ kvitancas
(R. Eichholz, dato)

La verko ne estos havebla pere de libro-servo, ĉar ĝi estas konstante reviziata kaj ni volas eviti, ke mendintoj povus ricevi malaktualiĝintajn versiojn. La elektronika versio kun pli ol 3 megabajtoj da registraĵoj kostos nur US\$ 20.00 kaj estos ĉiam kopiita de la plej aktuala versio. Bv. indiki ĉu ni sendu la registraĵojn sur 5 ¼ colaj aŭ 3 ½ colaj

diskoj. Ni ankoraŭ ne kapablas liveri registraĵojn sur diskojn kun alta denso. Mendintoj de PP povas je samtempa mendo pli favorpreze akiri jenajn librojn:

___ Esperanto en la Moderna Mondo (US\$ 10 anstataŭ US\$ 25, aŭ DM 15)

___ Esperanta Bildvortaro (US\$ 40 anstataŭ US\$ 48, aŭ DM 60) ambaŭ sen sendkostoj, se ĉio povas esti kune ekspedata.

=====
Skemo
por terminaraj projektoj aŭ
manuskriptoj
bv. sendi al: Bernhard Pabst,
Südweg 42
D-5202 Hennef 1, Germanjo
=====

Projekto/manuskripto (titolo):

_____de la jaro

nombro de terminoj:

Kunordiganto, adreso kaj evtl. telefono
(familian nomon majuskligu):

aranĝo:

_____ kun difinoj _____ sen difinoj
kun ekvivalentoj en jenaj lingvoj:

registro-maniero:

sur slipoj sur folioj perkomputore

a) _____ se sur slipoj aŭ folioj:
ĉ. _____ slipoj/folioj en formato

_____ tajpitaj, _____ manskribitaj

b) _____ se perkomputore

sistemo (ekz-e IBM, Atari, Mac, UNIX):

skrib- aŭ datumbenka programo (ekz-e
WordPerfect, Signum, WORD,
Paradox):

se alia formato ol IBM kaj WordPerfect:

ankaŭ havebla en ASCII:

_____ jes _____ ne

havebla elektronike sur

_____ diskedoj _____3,5- _____5,25-colaj
de jena denso _____ (en kilobajtoj) do
entute ĉ. _____ kb

_____ ja _____ ne havebla presite/print-
ite/kopiite sur _____ folioj/kopioj

kostoj (ald. mon-unuo):

por aktivaj kunlaborontoj senkosta

_____ jes _____ ne

nunaj precipaj mankoj, pri kiuj mi petas
helpon kaj kunlaboron (evtl. uzu apartan
folion):

pretigo alstrebita ĝis

_____ aliaj rimarkoj (uzu apartan
folion)

_____ bv. informi en „Terminoteko“
pri mia manuskripto / projekto,
indikante mian supran adreson.

dato, subskribo

*Enhave senŝanĝa represo de la eldono Decembro 1994.
Multaj kontakt-adresoj ne plu aktualas.
Pro la alia skribo la paĝo-indikoj en la enhav-tabelo eble ne plu ĝustas
kaj kelkaj specialaj simboloj eble estas ne ĝuxte redonita.*

*Grava nuntempa terminara projekto estas Reta Vortaro
<http://www.uni-leipzig.de/esperanto/voko/revo/>*

*Pri Terminoteko kontaktu nun
Bernhard.Pabst[ĉe]gmx.de
(anstataŭigu [ĉe] per @)*

*© Bernhard Pabst,
Aŭgusto 2006*